

LA SENĜOJAJ PERSPEKTIVOJ

En sia inaŭgura alparolo la Papo Benedikto la 16-a petis pri la preĝo, por ke li ne ektimu antaŭ la lupoj. Estis ĝi profeta atentigo. La lupoj aperis pli frue, ol oni atendis. En la tuta mondo estas aktivantaj fortoj, kiuj klopodas elpuŝi kristanisman el la postmoderna periodo kaj anstataŭi ĝin per io alia.

„Kristo estas nura mito“

En tiun kategorion apartenas ankaŭ la libro kaj la filmo „Da Vinci Code – Sacriligo“. Nur naŭvan kristanon tio povas surprizi. Ni devas esti preparitaj je ankoraŭ pli grandkalibra pafado. Kion la tiel nomataj bibliaj sciencistoj de la 19-a kaj la 20-a jarcento komencis, tion oni nuntempe akceptas, akcentigas kaj popularigas. La kristanismo onidire estas nura mito. La evoluo devas reveni je 2000 jaroj reen.

Homoseksuala premo estas ĉiam pli agresiva. En Moskvo, Varsovio kaj Bukureŝto okazas eksceso, el Kanado venas maltrankviligaj raportoj. Teroristoj tie planis atakon kontraŭ parlamento celante likvidi Stephen Harper, konservativan premieron.

Kulturo de la amo maloportunas

El judaismo alvenis antaŭ tri jarmiloj unua bridigo de la homa seksualeco, t.s. kultivado de la geedzeco kaj rifuzo de la homoseksualeco. Antaŭe en plejparto de la civilizacio estis praktike ĉio permesita, seksualeco zigzage kun kiu ajn, ekzemple ankaŭ kun la bestoj. Ĝis nun tion la heroldantoj de la libereco ne povas al judaismo kaj kristanismo pardoniti. La judaisman oni strebis ekstermi, kiel diras Benedikto la 16-a, celante, ke estu ekstermita Dio. Nun devas malaperi kristanismo kaj kun ĝi kulturo de ĝentilmora erotiko kaj amo.

„La kulto de sekso anstataŭ kristanismo“

Kio devus anstataŭi kristanisman? La respondo estas facila. Antaŭe staris en centro de la atento kultoj de fertilito, ekz. kulto de diino Afrodita ĉe grekoj kaj diino Venuso

ĉe romianoj. Ĉar la fertiliton oni nuntempe malŝatas, estis la sekskuniĝo separigita de la fertilito. La procesioj de la homoseksualoj en Berlino, Kolonjo, Parizo kaj Londono tion montras tute klare. Estas ili grandaj ekspozicioj de la seksualeco en mantelo de perverseca religia procesio. Dum mondĉampionado de futbalo oni proklamas devizon: Futbalo kaj sekso al si apartenas!

La virino laŭ revo de Dio

Kiajn elirsolvajn vidas la kristano? La Virgolino Maria ilin al ni montris en Fatimo kaj Meĝugorje kaj en aliaj lokoj. Ŝi rekomendas al la moderna homo, turni sin al Ŝi, al la plej perfekta modelo de la vera humanismo, al la Virino laŭ la revo de Dio. La Instruofico de la Eklezio tiun nelacigeble memorigas.

Post perfido de la kristanismo sekvas la morto

La Eŭropo ne transvivos la 21-an jarcenton. Tio estas konkludo, al kiu venis reprezentantoj de diversaj fakoj en Usono, kie oni la evoluon en Eŭropo atenteme observas, ĉar la evoluo en Eŭropo povas havi fatalan regresivan influon je Usono. Tiel pri tio raportas American Family Association.

Verkisto Mark Steyn skribis en gazeto The New Criterion, ke partoj de la eŭropa civilizacio malaperos kaj la nacioj de Eŭropo, kiuj fordonis sin al la falsa kulto de la libereco, estos regataj fare de islamo.

Sinmortigo de Eŭropo

Georg Weigel, katolika politika sciencisto kaj etikisto, aŭtoro de la libro „The Cathedral“, opinias, ke Eŭropo allasas al si „demografian“ memmortigon per tio, ke ĝi ĉiam pli multe depopulaciigas. La produktiva junularo nesufiĉas por kompensi dekreskon de mortokvanto. Kultura kritikisto Chuck Colson kompletigas, ke tiu sorto sekvas ankaŭ en kelkaj bonfartaj landoj de la orienta Azio.

Sociologo Ben Wattenberg avertas, ke ekde la duono de la 13-a jarcento, kiam Eŭropon dezertigis nigra pesto, neniam falis indekso de la naskokvanto tiel longdaŭre kaj tiel profunden kiel nun.

En la libro „Morto de Okcidento“ antaŭvidas la aŭtoro Patrick Buchanan rilate al statistikoj de UNO, ke la nombro de la loĝantoj en Eŭropo, kiu nun estas 728 milionoj, povas ĝis fino de la jarcento fali ĝis kvarono (207 milionoj). La fekundaj kampegoj ŝanĝiĝos je stepoj, kiuj sin malfermiĝos por muzulmanaj nacioj de la norda Afriko.

Filozofio de volupto

Ĵurnalistoj E. E. Veith en „World Magazin“ faras responsan por tiu ĉi malapero de la nacioj regreson de la valoro de la familio. La mondo estas volonta senvivigi sian estontan generacion. Triono de la embriiĝitaj infanoj estas mortigitaj en la patrino. En Ruslando submetiĝas al abortigo ĉiu virino meznombro kvarfoje. Je unu nasko du abortigoj. Alivorte Ruslando mortigas du trionojn de siaj infanoj antaŭ ilia naskiĝo. Allan Carlson, prezidento de la famili-asocio, tion komprenas kiel konsekvencon de filozofio de Okcidento orintita je volupto.

La tuta socia intereso estas orientita je konsumismo, al manĝo, ofta seks-praktikado kaj voluptoj.

Ĝi estas granda ironio de la sorto, ke la persona orientiĝo al volupto, ĝuemo kaj persona bonfarto kondukas fine al la ekonomia malprospero. Se en la jaro 2006 naskiĝis nur miliono da infanoj, oni ne povas atendi, ke la labormerkato havos en la jaro 2026 je dispono du milionojn de novaj laborpersonoj.

Tre pesimisme tion vidas Joseph Chamie,

direktoro de unu organizaĵo de UNO. Neniu politikisto plu kredas, ke okazos ŝanĝo de la starpunkto, se temas pri la junularo. Ĉiu scias, kiel estas malfacile konvinki la virinon pri la graveco kaj majesto de misio de la patrino.

Perfido de la kristana heredaĵo

Antaŭ 50 jaroj estis en Eŭropo 250 000 muzulmanoj. Nuntempe ili estas 20 milionoj. Se la evoluo plu iros tiudirekten, post 50 jaroj ili estos 160 milionoj. Poste la eŭropaj nacioj devos vivi sub la leĝoj de ŝario.

La hebrea kultura kritikisto Don Feder vidas en perfido de la kristanisma heredaĵo la plej ĉefan radikon de la populacia problemo en Eŭropo. Inter la 70 000 vortoj, el kiuj konsistas la eŭropa konstutucio, ekzistas eĉ ne unu vorto pri la kristanismo. Pli ol 1500 jaroj de la kristanismo estis simple ĵetita sub la tablon. En multaj eŭropaj landoj malkreskis partoprenado de Diservoj el 40 je 20 %. La perdo de la kredo kaj respondecado kondukas al rifuzado de la infanoj.

Nur historia rememoraĵo

Don Feder timas, ke post 50 ĝis 100 jaroj estos Eŭropo de Shakespere, Rembrandt, Bach kaj Karol Wojtyła trovebla nur en muzeo. Se la evoluo plu iros samtempan direktan, estos surstrataj skandaloj post la jaro 2010 kutimaj en pluaj urboj de Eŭropo kaj ni iĝos ĉiutage atestantoj de la raportoj pli ondo de la murdoj.

Dio en pratempo avertis Israelon pere de la profetoj. Ofte senrezulte. La senlima libereco de la unuopulo alkondukas Eŭropon al la totalitarismo de islamo kaj la okcidenta kulturo restos nura rememoraĵo. ■

El Christ von Morgen 6/2006